# Paroligilo pri -**a** vortoj

(gvidilo de la instruisto por la ludigo de ekzerco 3 de paĝo 20)

***Ludo pri ki*** kaj ***ĉu demandoj kaj*** -**a** vortoj

instru-materialo: ĉirkaŭ 30 mulditaj plastaj bestetoj aŭ bildkartoj.

**laŭpaŝe**:

**Instruisto** disdonu po 1 aŭ 2 “bestetojn” al ĉiu lernanto.

**Instruisto**, skribu sur la kretotabulo la ĉi-suban demand-liston. (Oni rajtas aldoni demandojn.)

**demand-listo**:

Kia ĝi estas?

Ĉu ĝi estas granda?
Ĉu ĝi estas danĝera?
Ĉu ĝi estas forta?
Ĉu ĝi estas alta?
Ĉu ĝi estas bela?
Kiu estas ĝia koloro?
Kion ĝi manĝas?
Kie ĝi vivas?

Ĉiu lernanto **montru** sian besteton **kaj diru** la ecojn de la reala besto reprezentata de la muldaĵo aŭ bildkarto, uzante la demand-liston, kun via helpo. “ *Ĝi estas* ... “

**Reprenu** ĉiujn bestetojn, apartigu plejeble la gelernantojn kaj disdonu ***sekrete*** po 1 besteton.

Ĉiu lernanto elektu sian unuan partneron por komenci la ludon.
Ĉiu lernanto rajtas fari nur po 5 demandojn.

Se la demandinto divenos per siaj demandoj la nomon de la besto, ŝi/li gajnas la besteton de la demandito.

Se la demandinto ne sukcesos diveni la nomon de la besto, tiu perdos sian besteton por la demandito.

Tiu kiu perdos sian besteton klopodu rapide reakiri novan de alia kolego.

**allogilo**: Unuopa lernanto aŭ skipo fariĝos “***ĉampiono***”.